Dufoje okazis Esperanto-kursoj por hispanparolantoj

	Lando	Kvanto laŭ lando
1.	Kolombio	233
2.	Meksiko	73
3.	Argentino	34
4.	Hispanujo	33
5.	Ekvadoro	27
6.	Peruo	24
7.	Bolivio	11
8.	Brazilo	11
9.	Ĉilio	11
10.	Salvadoro	9
11.	Venezuelo	9



En 2020, kunlabore kun *Kolombia Esperanto-Ligo* (KEL) kaj TEJO, UEA inaŭguris retan Esperanto-kurson por hispanparolantoj. Al ĝi aliĝis 672 homoj el 26 landoj kaj 51 volontulaj instruistoj. La kurso estis plene senpaga por ĉiuj. Laŭ la uzita metodo lernantoj dividiĝis en etaj grupoj, kiuj interŝanĝis dum entute pli ol 320 sesioj.
Fine de la kurso okazis ekzameno, kiu certigis ĉu partoprenintoj bone lernis kaj sukcesis atingi bazan nivelon de la lingvo post nur du monatoj. Kvankam la agado okazis kadre de la *Amerika Komisiono de UEA*, partoprenis ĝin personoj ankaŭ el Hispanio.
Oni povas legi pli pri la kreado de la kurso ĉe la artikolo "*Edukado: Neatendita latenta sukceso*" de la septembra numero de la revuo *Esperanto.*
Danke al tiu granda sukceso UEA havis multajn novajn individuajn membrojn (ĉefe TEJO-aĝajn) el hispanparolantaj landoj.

En 2021 UEA kaj KEL, partnere kun TEJO kaj Hispana Esperanto-Asocio (HEF) denove okazigis la kurson. Ĝi komenciĝis la 19-an de majo kaj finiĝis la 10-an de julio. Al ĝi aliĝis iom pli ol 500 personoj el 30 landoj

Kun la kursanoj laboris 12 instruantoj:

el **Kolombio:** Doniben Jimenez, Moisés Herrera, Luis Obando, Johnatan Torres, Juan Valencia;
el **Meksiko**: Araceli Aguilar, Carlos Velazquillo, David Ruíz;
el **Argentino**: Soraya Merlina, Daniel Cotarelo;
el **Ekvadoro**: Julio Toro; kaj
el **Venezuelo**: Jezer Dorante.

Edukado.net premias en 2021 la subajn kvar personojn, kiuj estis la ĉefaj motoroj de la kursaro.


Doniben Jimenez Jaramillo
1991 -
Kolombio


Luis Miguel OBANDO TOBAR
1995 -
Kolombio

Moisés Herrera Barrera
1996 -
Kolombio

Fernando Jorge PEDROSA MAIA Junior
1983 -
Brazilo

Fonto: Gazetara Komuniko de UEA, 2021, №948 kaj aliaj retaj komunikaĵoj